

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 3-a parto
Claude Gacond, 143-a radioprelego, 1966.06.29 & 1966.07.02

Cl.- Atentu esperantistoj! Ĉi tie vi aŭdas la Svisan Kurtondan Radiostacion. Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Ni raportis, kiel malfermiĝis la Nica Kolokvo, kiu ekzamenis pasintjare, kiel Unuiĝinta Naciaro povus adaptiĝi al la hodiaŭa mondo.

A.- Sinjoro Van Lanschot, prezidanto de la Monda Federacio de Batalintoj, parolis pri la neceso starigi internacian centron de informado pri la operacioj por la konservado de la paco. Lia federacio nun laboradas al la konstruo de tiu organismo.

Cl.- Monda Federacio de Batalintoj ankaŭ advokatas por la kreo de ofico de alta-komisaro ĉe UN por la protekto de la Homaj Rajtoj. Adopto de proceduro devus ebligi al neregistaraj organizaĵoj raporti pri neobservado de la Homaj Rajtoj far la registaroj, kiuj ilin ratifikis.

A.- Abato Pierre lasis la jurajn zorgojn al la juristoj. Lia interveno kunportis aliajn zorgojn. Estrante unu el la plej grandaj movadoj de helpo al malriĉaj loĝantaroj, li pledadis por monda patriotismo kaj montris la limojn de perfortemo en la hodiaŭa mondo. Ni citu lin :

Cl.- « *Ni ĉesis havi emon fariĝi partizanoj de kaŭzoj pli malvastaj, ol tiu de la universo mem ! Ĉu malbelas ami sian patrinon, ĉar oni amas sian patrion ? Same ne veras, ke oni estas malhelpata ami sian patrion, ĉar oni fariĝis pli lucida kaj ĉar oni scias, ke fakte tiu patrio ne plu povos kreski. Ni ĉesas ekĝoji, kiam nia patrio restas fremda al ia ajn sufero ekzistanta ie ajn en la mondo. »*

A.- Pasintan semajnon ni diris la grandegan valoron de la interveno de franca ambasadoro. Hodiaŭ ni dezirus povi traduki komplete la raporton de sinjoro Mac-Bride, eks-ministro pri eksteraj aferoj de Irlando. Tiu eksministro raportis pri la nuna jura internacia situacio. Ni citu lin :

Cl.- « *Ni alvenis al momento sufiĉe drama de la Historio, por ke oni ne plu kapablu kontentiĝi pri la aserto **Fiat justitia, pereat mundus – Okazu justico, pereu la mondo.** La nuna situacio diriĝu **Fiat justitia, ne pereat mundus – Okazu justico, ne pereu la mondo.***

A.- Pro tio la internacia juro devas ĉesi esti statika kaj sin bazi nur sur okazintaĵoj. Ĝi devas fariĝi dinamisma kaj konstrui la estonton. Ni devas esti kreemaj. Aŭdu lin :

Cl.- « *Nia individua kaj kolektiva komuna havaĵo meritas esti konservata, uzata kaj riĉigata per daŭra streĉo de krea imago kaj de konfrontado kun la novaj realaĵoj demografiaj, sociaj kaj ekonomiaj. »*

A.- Tiu eks-ministro demonstris, ke se antaŭe, parolante pri la Homaj Rajtoj, longe temis esence asekuri la protekton de la individuoj kontraŭ la troa potenco de la nacia povo, hodiaŭ tiu nocio ekprenis tute novajn dimensiojn. Ni ree citu lin :

Cl.- « *Hodiaŭ la rivalecoj inter la ŝtatoj kaj ties teritoriaj konkeremoj ne plu estas tiom je la bazo de la internaciaj militaj agoj. La debatoj, la tensioj kaj eĉ la armitaj konfliktoj ideologiecaj, kiujn ni konstatas iom ĉie, kun ilia minacado nin alkonduki en totalan militon, trovas sian veran originon en la maniero koncepti, respekti kaj respektigi la individuan en la sino de la moderna socio. Povas temi pri legitima defendemo de etnaj, religiaj aŭ ceteraj malplimultoj, aŭ tutsimple pri la rajto de gentoj libere vivi laŭ mem elektita politika reĝimo. La okazaĵoj tamen ne plu estas la nura protekto de la homa persono individue rigardata, sed la pluvivo mem de la homaro. »*

A.- Tiun teorion priskribon de la nuna internacia jura situacio bone kompletigis alia raporto de Pierre Cot, ankaŭ eks-ministro kaj nun prezidanto de Internacia Asocio de la Demokrataj

Kolokvo pri la adapto de UN al la hodiaŭa mondo
okazinta en Nico (Sudfrancio) la 27/29-ajn de majo 1965, 3-a parto
Claude Gacond, 143-a radioprelego, 1966.06.29 & 1966.07.02

Juristoj. Pierre Cot diris, kial multaj registaroj ne akceptas la nunajn internaciajn jurajn kutimojn. Tiu internacia juro fakte ebligis grandajn progresojn, sed ankaŭ plue favoras la kolonian superregadon. Ĝi ankoraŭ nun ĉiam favoras reganton malfavore al regato. Tial regatoj ne fidis al tiu juro. La okcidentaj landoj devis akcepti kunsidi en la Asembleo de Unuiĝinta Naciaro kun eks-koloniaj landoj. Hodiaŭ la okcidentanoj devas akcepti rediskuti siajn internaciajn jurajn kutimojn. Jen citaĵo :

Cl.- « *Se ni ebligis, ke la **internacia juro**, kies prilaboradon kaj modladon ni povas influi, ne restos simple **nia juro okcidenta**, sed fariĝos ankaŭ **objektiva juro**, tio estas juro favora al ĉiuj nacioj, kaj fariĝos vere tutmonda juro, tiam ni havos almenaŭ parte la ŝancon vidi la grandajn estontajn kverelojn kvietiĝi, kaj tio laŭ la ebloj de juraj procedoj. Sed se la ekskoloniaj nacioj daŭre ricevos la impreson, ke kiam ni parolas pri la **internacia juro**, tio celas plue favori la okcidentan mondon, tiam la koncernaj ŝtatoj ekskoloniaj ne havos alian elirejon, ol ribeladon kaj sinturnon al perforta rezisto. »*

A.- Konklude al la unua kunsido de la Nica Kolokvo estis legita mesaĝo de sinjoro Thant, la ĝenerala sekretario de Unuiĝinta Naciaro. En tiu mesaĝo legita de reprezentanto de UN, sinjoro Thant diras la gravecon de la krizo de UN kaj ankaŭ la gravecon de kolokvoj, kiel tiu okazanta en Nico. Poste li diris sian personon pri la adaptado de UN al la hodiaŭa mondo. Ni citu lin :

Cl.- *Ĉu necesas, ke estu UN, ties Ĉarto kaj ĉefaj organoj, kiuj adaptiĝu al la hodiaŭa mondo ? Ĉu ankaŭ ne necesas, ke la hodiaŭa mondo provu pli ofte inspiriĝi el la idealoj kaj celoj de la Ĉarto de UN ? Laŭ mi, diras sinjoro Thant, devas okazi reciproka adaptiĝo kaj pro nenio cedo al oportunecaj konsideroj aŭ al momenta malkuraĝo. Ni neniel devas febligi la idealojn kaj celojn de la Ĉarto. »*

A.- Sinjoro Thant aldonas, ke oni devas dinamisme interpreti tiun Ĉarton, kies multaj punktoj ankoraŭ neniam realiĝis.

Cl.- Pri la aliaj kunsidoj de la Nica Kolokvo ni raportos dum la venontaj semajnoj. Post aŭskultado de tiu raporto skribu viajn impresojn. Tiel tiu kolokvo fariĝos nia kolokvo.

A.- Vi aŭdis Radio-Svislandon.

Cl.- Claude kaj Andrée Gacond diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-